DEMOKRATIA KOMUNIKADO • PEDAGOGIA EFIKECO

# NIA PONTO


**Grupo Esperantista de Bilbao**
Barrencalle Barrena, 7-1ª deks.
48005-BILBAO (Hispanujo)
✍ *Redaktas:*
Jesús-Miguel García Iturrioz

**Kunven-tago:**
Vendredo (19:30-21:00 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

(La E-Grupo de Bilbao estis fondita la 20an de majo de 1906)
TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: **60** €. ● Familia: **70** €. ● Juna (ĝis 30 jaroj): **20** €.
**KUTXABANK-konto** (IBAN-kodo): **ES44-2095-0023-5122-1800-1550**

**OKTOBRO-DECEMBRO 2025** **Nro. 145 (4/25)**



**Portugalete, sidejo de la venonta Hispana Kongreso (14/18 julio 2026)**

**Ne forgesu, ke la 31an de decembro finiĝas la unua aliĝperiodo, kiu enhavas interesan kotizrabaton**

Aliĝilo, provizora programo, listo de aliĝintoj, informoj diversaj ĉe
**https://kongreso.esperanto.es/**

**LOKE**

## Ni fariĝis proprietuloj de nia sidejo.

Post pli ol unu jaro de kiam nia advokato prezentis la unuajn dokumentojn en juĝejo, la pasintan 22an de oktobro juĝisto verdiktis, ke la Grupo Esperantista de Bilbao havas la rajton alpropiĝi lokalon, kiu estis sia sidejo dum 66 jaroj.

Por tiuj, kiuj ne sciis pri la historio de nia sidejo, ni diru ke ĝi apartenis al sindikato de oficistoj, kiu aktivis ĝis la eniro en Bilbaon de la trupoj de Franco dum la hispana enlanda milito (1936-1939). Tio okazis la 19an de junio de 1937.

Post tio, la sindikatoj estis malpermesataj, sed restis la sidejo, malplena kaj, ŝajne forgesita. Kelkaj membroj de tiu sindikato ankaŭ estis esperantistoj kaj proponis eniri la lokon kaj tie starigi la sidejon de la E-Grupo. Inaŭguro okazis la 18an de oktobro 1959.

Kaj ekde tiam ĝis nun pasis 66 jaroj, dum kiuj estis diversaj okazintaĵoj, agrablaj kaj malagrablaj. Certe tre grava novaĵo, kiu transdonas ĉefe trankvilecon.




*15a de decembro 1958. Lasta Z-festotago ekster la nova sidejo.*

## Por fin, somos propietarios de la sede del Grupo.

Después de más de un año desde que nuestro abogado entregó los primeros documentos en el Palacio de Justicia de Bilbao, con fecha de 22 de octubre una jueza ha dictado una sentencia por la que se reconoce al Grupo Esperantista de Bilbao como único propietario de la que ha sido nuestra sede durante 66 años.

Para quienes no estabáis al tanto de ello, el dueño del piso era el “Sindicato libre de empleados de oficinas”, sindicato ilegalizado tras la entrada de las tropas de Franco en Bilbao el 19 de junio de 1937.

Han sido 66 años de dudas y también de miedos, en tiempos de la dictadura, para empezar un proceso de este tipo del que no se sabía cómo podía terminar.

Pero por fin se ha conseguido y no podemos por menos que recordar a todos los que nos han precedido y que estarían realmente satisfechos de lo conseguido.

**LOKE**

## Kristnaska loterio.




Ni rememorigas vin ĉiujn, ke daŭrigas disvendado de la tradicia kristnaska loterio kun biletoj tute en Esperanto. La ĉijara numero estas **33274**.

**Ĉiu bileto kostas 5 €**, el kiuj oni lotludas 4 € kaj restas 1 € kiel donaco al la Grupo.

**Oni rezervas biletojn al neniu**. **Lasta tago por aĉeti: vendredo 12a de decembro, kiam ni okazigos alian tradiciaĵon: la zamenhofan festotagon**.

**Kaj memoru ke, kiel kutime, ankaŭ eblas aĉeti loterion per interreto**:

Por tio sekvu la jenajn paŝojn:

1. Enkontigu la monon en la konto de la Grupo Esperantista de Bilbao. IBAN-kodo: **ES44-2095-0023-5122-1800-1550**.
2. Sendu retmesaĝon al **esperantobi@gmail.com** informante pri la monenkontigo.
3. Ni sendos la **skanitajn** biletojn per retpoŝto. La originaloj restos en la E-Grupo de Bilbao.
4. Se la biletoj estus premiitaj, ni rekte sendus la monon al la bankokonto indikita de la aĉetinto, tute senpage por li/ŝi.
5. Tiu, kiu volus ricevi la originalajn biletojn post la lotado, bv. sendi retmesaĝon al **esperantobi@gmail.com** kaj ni sendos ilin per normala poŝto al la adreso indikita de la aĉetinto.

**Os recordamos que continúa la venta de billetes de lotería en el Grupo que, como siempre, aparecen escritos en Esperanto. Y que también se puede hacer la compra por internet. El último día de compra será el viernes 12 de diciembre, día en que también celebraremos la “zamenhofa festotago”.**
**No se reservan billetes para nadie.**

Para la compra por Internet, hay que seguir los siguientes pasos:

1. Primero, hay que ingresar el dinero en la cuenta del Grupo Esperantista de Bilbao. IBAN: **ES44-2095-0023-5122-1800-1550**. **Cada billete cuesta 5 €**, de los que se juegan 4 €, quedando 1 € como donativo para el Grupo.
2. Enviar un e-mail a **esperantobi@gmail.com** dando cuenta del ingreso.
3. Enviaremos los billetes, **escaneados**, por e-mail. Los originales quedarán depositados en el Grupo de Bilbao.
4. Si los billetes resultan premiados, enviaremos el dinero, directamente, a la cuenta indicada por el comprador, sin gasto alguno para éste.
5. Quien quiera recibir los billetes originales, una vez realizado el sorteo, debe enviar un e-mail a **esperantobi@gmail.com** y se los enviaremos, por correo ordinario, a la dirección que se nos indique.

**LOKE**

## Pri la kongreso ...

- Ne forgesu, ke **la 31an de decembro finiĝas la unua aliĝperiodo**. En ĝi oni rajtas rabatitajn kotizojn. Do, rapidiĝu kaj aliĝu.
- Ĝis la 30a de novembro jam aliĝis preskaŭ **40 homoj**.
- Baldaŭ ni informos pri **ekskursoj kaj bankedo**. Tre probable devos esti limigita nombro de partoprenantoj por ambaŭ, do rapidiĝu aliĝi.
- Ĉiuj informoj pri la kongreso (listo de aliĝintoj, utilaj informoj, aliĝiloj, ktp. troviĝas en la retejo de Hispana E-Federacio ĉe

**https://kongreso.esperanto.es/**

## Zamenhofa festotago en la E-Grupo de Bilbao.

Kiel tradicie, ankaŭ ĉijare ni kunmemoros la naskiĝtagon de la elpensinto de Esperanto, Dro. Zamenhof. Tiu tago estas ankaŭ la tago de la Esperanta Libro, en kiu esperantistoj aĉetas librojn kaj donacas ilin unu la alian.

Ni renkontiĝos en nia sidejo la **vendredon 12an de decembro je la 19:00 h**. kun la jena eventuala programo:

1. Informa parolo pri la ĉefaj okazintaĵoj dum la jaro 2025.
2. Informa ronda tablo pri la kongreso de 2026 en Portugalete.
3. Komuna manĝo, ene de la sidejo aŭ ĉe apuda trinkejo.

## Kunveno de eŭskaj esperantistoj.



Meze de novembro, grupo de eŭskaj esperantistoj kunvenis proksime de pirenea montaro de Navaro.

Sur la foto, kelkaj el ili en Irañeta ĉe monumento al Mariana Sanz Huarte (Irañeta, 1868 / Pampeluno, 1936).

Ŝi estis elstara pedagogo kaj verkisto, kiu multe laboris pri la edukado de instruistinoj de elementaj lernejoj. Dum multe da jaroj estris la lernejo de kie eliris tiaj instruistinoj.
Ankaŭ elstara feministo el katolika vidpunkto kaj simpatianto de Esperanto.

**HEF**

## Oficiala peto por organizi la hispanan kongreson de 2027.

Alvenis al HEF propono, kaj estis aprobata, por organizi la HEF-kongreson de 2027. Ĝi okazus en **Villanueva de la Serena** (Badajoz), urbo kiu situas apude de Donbenito. Organizus ĝin Javier Romero kaj Kani.

Villanueva de la Serena estas urbo de 25.000 loĝantoj, kun tre moderna kongresejo kaj eble tiam estos jam okazinta la unuiĝo de ambaŭ urboj en unu sola, nomata Vegas Altas. Tiu ĉi "nova" urbo havos pli ol 60.000 loĝantojn.

La organizontoj ne ankoraŭ kontaktis la urbestraron. Tamen, demarŝoj komencos baldaŭ kaj ili plu informos la HEF-estraron.

## Prezentado de libroj.

Pasintan 6an de novembro oni prezentis la lastan poemaron de Armando Silles McLaney, "Poesía luz me urge / Poezio lumo al mi urĝas /Urge-me poezia-luz".

Temas pri trilingva antologio de la aŭtoro, tradukita en Esperanton de Miguel Fernández kaj en la portugalan de Carlos d'Abreu. Estis planita la partopreno de Miguel Fernández en la Prezentado, sed fine ne eblis al li ĉeesti. Anstataŭis lin Ana Manero. Partoprenis ankaŭ la kantistino Chega Gómez. Ĉio disvolviĝis en tre agrabla intima etoso.

Kaj du pliaj dulingvaj libroj (Esperante/hispane): "Gadir", poemaro de J. Camacho kaj "Maruja Mallo, multe pli ol avangarda artistino", verkita de Ana Manero kaj eldonita de SAT-en-Hispanio.

*(Vacapa Kanalo Esperanto)*

## Helpoj de Fondaĵo Esperanto por 2025

La Fondaĵo Esperanto, kun sidejo en Zaragozo memorigas ke ĝis la 30-a de novembro oni povas peti subvenciojn por esperantistaj aktivaĵoj kun rilato al la internacia lingvo. Oni prioritatigas helpojn por instruado kaj disvastigado de Esperanto, eldono de libroj en aŭ pri Esperanto, realigo de eventoj, sed eblas prezenti aliajn sugestojn aŭ proponojn.

Kutime, oni helpas prefere al E-grupoj kaj pro aktivaĵoj jam faritaj, sed ĉijare denove oni disponas je pli da mono pro la ricevo de novaj donacadoj kaj al kresko de enspezoj.

## Nova kalendaro de CSIC por 2026.

Same kiel okazis la lastajn jarojn, CSIC (Supera Centro pri Sciencaj Esploroj de Hispanio) denove petis la kunlaboron de HEF por aperigi sian kalendaron kun sciencaj datrevenoj kaj okazintaĵoj.

Jam formiĝis skipon, kiu prilaboras la aferon. La kalendaro, kiel kutime, aperos dum la monato decembro.

## TRA LA MONDO …

## Mortis nia amiko Roman Dobrzyński.



"Kun granda bedaŭro mi informas, ke hodiaŭ matene, la 13an de novembro, antaŭ vojaĝo al renkontiĝo en Bjalistoko, forparis Roman Dobrzyński, la varsovia ĵurnalisto, reĝisoro de la Pola Televido, verkisto, kaj, kio al ni plej gravas, amiko de ni ĉiuj.
Ripozu Roman en paco!".

El Fejsbuka paĝo de "Varsovia Vento" alvenis tiu ĉi terura kaj surpriziga novaĵo pri morto de Roman.

Granda amiko de Hispanio, li plurfoje vizitis nian landon, unuafoje en 1964 rajdanta polan skoteron "Osa", tiel kiel li rakontis en sia lasta libro "Romano pri Romano"; lastfoje li vizitis Hispanion en 2017 por partopreni la 76an Hispanan Kongreson en Teruel, kie oni prezentis la tradukon al la hispana de lia verko "La Zamenhof-strato".



Sed ne nur li estis amiko de Hispanio. Li ankaŭ estis amiko de Bilbao kaj tieaj esperantistoj, kun kiuj interŝanĝis, de tempo al tempo, retmesaĝojn. En ili, li interesiĝis pri diversaj aferoj, eĉ pri futbalo. Kiam la loka temo "Athletic Club de Bilbao" gajnis finalon de "superpokalo" al ĉiopova Barcelona, li skribis gratulan mesaĝon.

Sur la dekstra foto, ne tro bonkvalita, Roman (meze) pozas kun Jesús kaj Eduardo Larrouy dum vizito al nia urbo kaj unusemajna restado ĉe Jesús, en marto 2004. Li planis fari videon pri Vaskujo, kio finfine ne efektiviĝis.

Antaŭ ĉio forpasis ege bonkora homo.

## Nova PIV estos pli ilustrita kaj unuavice reta.


La prova versio de la nova Plena Ilustrita Vortaro (PIV) nun estas libere alirebla en la reto. Bertilo Wennergren okupiĝas pri la renovigo de la plej grava Esperanta vortaro preskaŭ plentempe ekde 2020.

Bertilo Wennergren laboras pri la ĝisdatigo de Plena Ilustrita Vortaro kune kun granda teamo de diligentuloj.

La estonta PIV estos unuavice interreta vortaro, kiu povos esti konstante korektata, kompletigata kaj ĝisdatigata. Ni plu havas planon el ĝi fari ankaŭ paperan version. Sed la papera versio neeviteble estos iom malpli kompleta ol la interreta versio.

Por ebligi tian teaman laboron Bertilo kreis apartan redaktejon en la Interreto, kie ili povas tuj vidi ĉion, kion faras ĉiu alia teamano.

*("Libera Folio. 2025-10-14)*



# Utilaj informoj por la HEF-kongreso 2026

**Kongresejo**. Sidejo de UNED-Bizkaja. Parque Ignacio Ellacuría, 3. 48920-Portugalete (Bizkaia).

**Urbo**. Portugalete, urbeto kun 45.000 loĝantoj. 12 km. norde de Bilbao, kiu estas la ĉefurbo de la provinco Bizkaia.

**Hoteloj**. Ne multas en Portugalete. Pro tio, **ni rekomendas fruan rezervon**. Tamen, Bilbao troviĝas je nur 20 min. de Portugalete per metroo kaj tie estas sufiĉe da restadejoj. Ankaŭ en la urbetoj, kiuj troviĝas sur la vojo de Bilbao al Portugalete. Tiuj urbetoj estas: Barakaldo (100.000 loĝantoj), Sestao (30.000 loĝantoj) kaj Santurtzi (50.000 loĝantoj).

La hoteloj plej proksimaj al kongresejo estas:

- Hotel Puente Colgante (Portugalete). 10-15 min. piede.
- Hotel Palacio Oriol (Santurtzi). 5 min. piede.
- Hotel San jorge (Santurtzi). 20 min. piede.

## Veturado ene de la provinco Bizkaja.

Ni rekomendas aĉeti karton nomata "Barik", kiu kostas 3€. Post aĉeto, oni devas enmeti monon en ĝi, ĉu per bankokarto, ĉu per kontanta mono, en la maŝinoj, kiuj troviĝas en ĉiuj metrostacioj aŭ en diversaj surstrataj kioskoj. Unu sama karto povas esti uzata de pluraj homoj kaj validas por la diversaj veturiloj: metroo, busoj, trajnoj de nacia kompanio RENFE, tramo de Bilbao, kablotramoj, pendoponto de Portugalete, ...

## Alveno al kongresejo.

**Per aviadilo**. Se vi ne deziras kapti taksion, iru al buso kiu troviĝas ĉe la elirejo de la flughaveno, en ĝia plej dekstra flanko. Antaŭ ol eniri buson, vi povas aĉeti la karton "Barik" (3,00€) kaj plenigi ĝin per bankokarto aŭ per kontanta mono; ankaŭ eblas pagi al ŝoforo per kontanta mono, sed estos pli multekoste. La buso, post 20 min., alvenas al la centro de Bilbao kaj finiĝas ĉe la centra busstacio, nomata "Termibús". Se bezone, tie mem troviĝas metrostacio kaj pluraj busoj al diversaj lokoj.

**Per metroo**. Estas du ĉefaj metroo-linioj. Tiu, kiu iras al Portugalete, estas linio 2. La trajnoj portas la nomon de la lasta stacio; eniru trajnon al "Kabiezes". Atentu, ĉar la linioj 1 kaj 2 kunhavas samajn staciojn ene de la urbo Bilbao.

Por iri al kongresejo, eblas eliri en du stacioj: unu estas “Portugalete”, elirejo “Carlos VII”. 10-15 min. piede al kongresejo; la alia estas “Peñota”, elirejo “Hospital San Juan de Dios”. 5-10 min. piede al kongresejo.

**Per trajno**. De la centra stacidomo de Bilbao, nomata “Abando”, eliras trajnoj de la nacia kompanio RENFE al “Santurtzi”. Laŭ la sama trako iras ankaŭ trajnoj al “Muskiz”. Ne eniru ilin! Survoje al Santurtzi, unu haltejo estas “Peñota” (5-10 min. piede ĝis la kongresejo). Ne eliru en stacio “Portugalete” ĉar estas iom malproksime de la kongresejo.

**Per buso**. Apude de la sama centra trajna stacidomo de Bilbao, nomata “Abando”, eliras buso numero 3115, kiu trairas la antaŭa ŝoseo de Portugalete al Bilbao kaj haltas ĉe la kongresejo mem (haltejo: “San Juan de Dios (Hospital)”); tiu buso iras plejparte paralele al la rivero Nerviono kaj permesas rigardi diversajn lokojn, sed bezonas 45 min. por iri de Bilbao al Portugalete.

**Per aŭtomobilo**. Kutime, oni venas al Portugalete per granda aŭtovojo A8, kiu iras de la franca landlimo al Santiago de Compostela.

En Portugalete eblas surstrate parkumi senpage. Same en proksimaj urboj. Oni devas pagi nur en Bilbao kaj Barakaldo.

Tamen, ne facilas trovi liberajn lokojn por lasi la aŭtomobilon. Por parkumi ni rekomendas grandan komercan centron “Ballonti” kaj apudajn stratojn. De tie al kongresejo, ĉirkaŭ 20 min. piede.

Atentu, ke la centro de Bilbao estas “zono de malalta polucio”, do aŭtomobiloj, kiuj ne surportas devigan glumarkon estas monpunataj. Baldaŭ, same okazos en urbo Barakaldo, sed ankoraŭ la urbestraro ne decidis ekde kiam.

Simbolo de la metroo de Bilbao




Transportkarto “barik”

**LA E-GRUPO DE BILBAO TUTKORE DEZIRAS, AL LA TUTA HOMARO, TRE SUKCESAN, PACAN KAJ FRUKTODONAN JARON 2026-AN.**